


**ROK XXVI.
KWIECIEŃ 1932.
N-r 4.**



**JARO XXVI.
APRILLO 1932.
N-o 4.**



Domego de Jagiellona Universitato en Kraków.

ESPERANTYSTA POLSKI POLA ESPERANTISTO

WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO &
EL DONANTOJ: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW

ADRES REDAKCJI I ADMINISTRACJI: KRAKÓW, ul. LUBICZ 34

REDAKTORZY PROF. DR. ODO BUJWID REDAKTANTOJ
TADEUSZ HODAKOWSKI

REDAKTOR ODPOWIEDZIALNY: JULJUSZ KRISS.

PRENUMERATA: rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towarzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem) roczna prenumerata Zł. 6.—.

ABONO: jare Zł. 8.—, duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.—

Konto Pocztovej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Pojedynczy numer Zł. 0.70 Aparta numero.

OGŁOSZENIA:

| | |
|----------------------|----------|
| 1 strona | Zł. 60.— |
| 1/2 strony | " 32.— |
| 3/4 strony | " 17.— |
| 1/8 strony | " 10.— |

ANONCOJ:

| | |
|--------------------|----------|
| 1 paĝo | Zł. 60.— |
| 1/2 paĝo | " 32.— |
| 3/4 paĝo | " 17.— |
| 1/8 paĝo | " 10.— |

PRZEDSTAWICIELE — REPRESENTANTOJ.

Katowice: Soc. de Esper. Amikoj, Wawelska 3.

Paryż: S. Grenkamp, Paris 6. 4 rue de Vaugirard.

Warszawa: Pola Stud. Esperantista Societo, Leszno 99. m. 5.

Przyjmują zamówienia abona-
ment. i ogłoszenia do „Polskiego
Esper.“ i „Pomocniczego Języ-
ka Świat.“

Akceptas abonojn kaj anon-
cojn por „Pola Esperantisto“
kaj „Pomocniczy Język Świa-
towy“.

WAŻNE DLA CHCĄCYCH KORESPONDOWAĆ Z ZAGRANICĄ!

Atentu! Ni malfermas en nia revuo la fakon: „Korespondado“.

Anonceto de 10 vortoj (krom adreso) kostas Zł. 1.—.

Enpagu tuj je nia PKO. Konto 406.660.

Por kompletigi mian bibliotekon, mi dezirus aĉeti la Unuajn Zamenhofajn Verkojn, komencante de 1887. same esper. gazetoj — aŭ interŝange. Interesemuloj skribu al: Ad. Oberrotman, Warszawa, Krakowskie Przedmieście 10.

DO P. T. CZYTELNIKÓW!

Upraszamy uprzejmie P. T. Czytelników o załączenie znaczka pocztowego na odpowiedź, przy wszelkiej korespondencji, zarówno redakcyjnej jak i administracyjnej.

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO
KAJ EKSTERLANDE.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE
I ZAGRANICĄ.

ROK XXVI JARO

K R A K Ó W
KWIECIEŃ 1932 APRILO

Nr. 4 Nr-o

ANTAŬ GRAVAJ DECIDOJ.

(PLEBISCITO POR INTERŜTATA AKORDO ESPERANTA).

Trapensinte artikolon de L. Krysta en marta numero de Pola Esperantisto, mi opinias, ke lia projekto estas bona, malgraŭ tio, kion mi skribis en la sama numero. Temas ĉefe pri teknika flanko. Bibliotekon de subskribaj folioj oni ne povas uzi pro ĝia amplekseco dum ia aŭdienco. Sed oni povas uzi ĝin alimaniere: fari laŭ ĝi **statistikon** kiom multe da personoj kaj kiaj fakoj subtenas ideon de deviga instruado. „Biblioteko“ iros al arkivo, statistikon oni uzos dum traktadoj. Krom tio ĝi estos bona propagandilo montranta, ke io fariĝas grava en nia movado. Sed paralele kun tiu ĝenerala plebiscito estos organizita plebiscito po-societa (sekve: instruista, advokata, kuracista k. t. p.). Tiun ĉi ideon mi jam prezentis dum Lodza kongreso 1930.

Kompreneble por tion prepari zorgeme oni devas: a) eldoni instrukciojn por la agantoj, b) sendi la sciigajn bultenojn al ĵurnaloj nacilingvaj, klarigante al neesperanta publiko pri graveco de entrepreno kaj pri esperantismo ĝenerale. Tio estas detaloj priparoleblaj dum kongreso, kiujn mi estas preta prizorgi.

Pli respondema kaj pli — malfacila estos varbado de societoj. Ĝi postulos specialajn agentojn, kies nomojn povas liveri libro de Jan Zawada.

La plebiscito daŭros eble 1 aŭ 2 jarojn.

Koncerne la tekston de subskriba listo mi opinias, ke la teksto proponita de L. Krysta estus bona, sed ne estas ankoraŭ plena. Nepre necese estas aldoni: „...la ministerion de klerigado. Pro tio, ke eklerno de esperanto per unu nacio, sen samtempa eklerno de ĝi per la aliaj ne gvidus al celo — la subskribintoj turnas sin al ambaŭ ministerioj de klerigado kaj eksteraj aferoj, por ke la pola registaro alpaŝu al Interŝtata Akordo Esperanta, havanta por celo ne pli frue validigi tiun-ĉi decidon, ol kiam 6 ŝtatoj promesos la samon“.

Sen tiu-ĉi aldono oni senigas la rezolucion de la plej ĉefa ideo. Tial oni ne devas presi la foliojn por subskripcio antaŭ ol oni konsentos pri la teksto.

Komencon oni povus fari tuj post la akcepto de la teksto. (Ĉu ni ĝin akceptos en Lublin aŭ nun?). Tro longa diskuto lamigus la tutan de-

mandon. Post la komenco oni invitos aliajn landojn la samon fari. I. C. K. estas institucio troŝargita per laboro kaj komence ne bezonas klopodi pri tiuj-ĉi entreprenoj, des pli, se ĝi „ne vidis eblecon fari ĝin“, kiel nin sciigas L. Krysta. „Exempla docent“ — „Ekzemploj instruas“. Aliaj landoj nin rapide sekvos.

Pluan planon mi prezentis en mia „Minacas krizo“ (paĝo 69—70).

Dr. Antoni Czubyński.

Adreso: Mława, Gimnazjum żeńskie.

PRI ESPERANTA PROPAGANDO.

Lastatempe en la esp. gazetaro oftigas artikoloj, kiuj penas konvinki nin, ke ĝisnunaj metodoj de esp. propagando ne estas sufiĉaj kaj ke ni devas trovi novajn metodojn por venki la mondon.

Speciale interesaj tiurilate estas artikoloj de S-ro Lejzerowicz en „POLA ESPERANTISTO“ No 2 — 1932 kaj de S-ro Einar Dahl en „HEROLDO de ESPERANTO“ No 9 — 1932.

La unua, ne vidante tujajn rezultatojn de la esp. kursoj, de propagandaj artikoloj ktp., instigas la esp-aron al „pli grandskalaj propagandaj entreprenoj“, — konsilas turni sin al „principe“ subtenantaj Esperanton homoj, favoraj al nia ideo neesperantistoj, kiuj ne havante eblecon lerni Esp., tamen rilatas simpatie al nia movado kaj donos sian apogon al la „grandskala propaganda entrepreno“.

S-ro Lejzerowicz proponas do nun organizi kolekton de subskriboj de tiaj „favoruloj“ sub devizo: „Esperanto en lernejojn“.

La dua aŭtoro, S-ro Dahl, ankaŭ estas malkontenta pro la ĝisnunaj propagandaj metodoj kaj laŭ la sama vidpunkto konsilas turni sin al diversaj Asocioj, Federacioj, Kluboj ktp., havantaj internaciajn celojn ekz. al Pac-Asocioj, Turismaj Komisionoj, Komercaj unuiĝoj, Skoltaj movadoj ktp. Se tiaj Asocioj esprimus sian teorion favorecon al nia movado, ni povus apogi nin sur ilia aŭtoritato kaj venkus.

Ni povas konstati, ke ambaŭ projektoj havas la saman devenon, la samajn motivojn kaj la saman celon.

Nenio pli prava, ol la supra ideo de ambaŭ cititaj aŭtoroj. Ambaŭ projektoj ne nur estas bonaj kaj subtenindaj, sed tre kredeble alportos gravajn fruktojn.

Ni ne forgesu ankaŭ, ke tre ŝatata estas opinio de famaj personoj. Sed ili plej ofte estas tro aĝaj por lerni nian lingvon, kvankam ili ĝin tutkore aprobas kaj deziras vidi venkontan.

Ekz. la fama Prof. Charles Richet, laŭreato de Nobela Premio, estas konvinkita esp-isto, sed ne parolas Esp. La Papo Pio XI simpatias al nia movado. Ĉu ni atendu, ĝis kiam Li lernos Esp.? Same la fama Henri Farman aŭ Upton Sinclair, kiu diras: „Mi antaŭvidas, ke ne post 3 jarcentoj, sed post 3 jardekoj el 10000 homoj 9995 aŭskultados Esp. per Radio“.

Aŭ la franca Eksministro, Senatoro Charles Chaumet, kiu konsilante enkonduki Esp. en Internaciajn Kongresojn por gajni la tempon, finas sian artikolon jene: „Ni lasu al rutinistoj elĉerpi iliajn vanajn kritikojn, ili neniam sukcesos haltigi la progreson!“ Tiajn voĉojn ni ne devas neglekti.

Mi pensas, ke la enketo de S-ro Lejzerowicz sukcesos, ĉar troviĝos nur izolaj personoj, kiuj rifuzos subskribi la enketon. Lernos do ne ili, sed iliaj infanoj. Cetere ni ne forgesu la ĵusan sukceson de simila petskribo pri la „strato Zamenhof“ en Warszawa.

Nur unu modesta rimarko. Se ni subite ricevus permeson tuj enkonduki en ĉiujn lernejojn Esperanton, ĉu ni trovus sufiĉan nombron da instruistoj por tia amaso da lernejoj? Kaj ĝuste tial mi pensas, ke kursoj estas ankaŭ urĝe necesaj kaj ankaŭ grandstile. **Dr. Wilhelm Róbin.**

PROF O. BUJWID.

PARTOPRENO DE POLLANDO EN LA MONDA KULTURO.

(RADIOPAROLADO DE 30. III. 1932).

En tiu malgranda skizo ni deziras kolekti nur plej ĝeneralajn sciigojn pri la temo.

Unuaj, kiuj mencias pri Pollando, estas Arabaj vojaĝantoj. En la 965 j. Ibrahim, sendita al la germana imperiestro Otto, vizitis Bohemujon kaj Polujon kaj priparolas la reĝolandon de Mieŝko la I-a, plej grandan el la slavaj landoj. Li mencias multajn muzikilojn kaj priparolas diversajn konstruaĵojn kaj aranĝojn.

Preskaŭ samtempe aliaj arabaj vojaĝantoj priskribas artecon kaj riĉecon de t. n. gontinoj — antaŭkristanaj preĝejoj. En XII jarc., ili nomas Polujon lando de klerigo.

Germanaj pioniroj enkondukante kristanisman konstatas la samon pri arte konstruitaj ejoj. Kelkaj el polaj konstruistoj estas konataj aliande. Sokolnik el Kraków en 1144 laŭ ordono de la imperiestro Henriko la I-a konstruis la konatan katedralon en Vieno de sankta Stefano. Ankaŭ aliaj estas menciitaj en la memorlibroj de tiu konstruaĵo: Tobias el Kraków, Karlo kaj Jozefo el Gdańsk (Danzig). Al Praha estis invitataj por konstruo de la preĝejoj de s-ta Veito Henriko kaj Petro. En Polujo estis konata Tenczyński, konstruisto de multaj preĝejoj kaj kasteloj sub la reĝo Kazimiro la granda, kiu, kiel oni diras, ricevis la polan landon ligne konstruitan, sed postlasis ĝin ŝtone konstruitan.

Poloj precipe estis terkulturistoj. Ili unuaj eltrovis plugilon; kaj slavoj la unuaj eltrovis la bieron. Tiuj eltrovaĵoj estis akceptitaj de Germanoj, same kiel la abelkulturado. Diversaj fremdlandaj aŭtoroj speciale ŝatas polan mielon. Ankaŭ abelkulturaj asocioj estis ofte menciitaj. Ne malpli gravan rolon ludis la mineja arto. En Olkuŝ proksime al Kraków estis famaj arĝentminejoj, pri ili parolas jam bullo de Papo Inocentio la II-a en 1136. Evidente ankaŭ la ferminejoj estis ekspluatataj jam de pratempoj. Famekonataj estas la salminejoj en Wieliczka, tiom laŭdataj de ĉiuj vizitantoj ankaŭ dum la lasta Esp. Kongreso. Ili ekzistas jam 800 jarojn!

Manufakturo, fabrikado de tukoj kaj drapoj ankaŭ tanejoj jam longe estis konataj. Speciale la drapoj el Kaliŝ jam en la 1201. Multaj germanaj aŭtoroj priskribas la riĉecon de artaj orbrodaĵoj en la reĝa kortego de Plock. Hodiaŭ ankoraŭ oni povas admiri la restaĵojn de tiuj brodaĵoj ĉe la katedralo en Wawel-kastelo.

La scienco en tiuj tempoj nenie posedis nacian karakteron, ĉar estis latinroma, sed oni mencias faman polan kuraciston en Bolonja, poste rektoron de la universitato, Jan Emerik. Samtempe ĉe Montpelier estis Nikolao Polak. Estas fame konata nomo de Ciolek, kies optikaj skribaĵoj liveris al Kepler kaj Newton fundamenton por iliaj verkoj.

Dum renesanco, el Italujo elfluas la radioj de l' kulturo al aliaj eŭropaj landoj: Anglujo, Francujo, Polujo. Al ni la itala kulturo alvenis multe pli frue ol al Germanujo. El la Bazilea sinodo reprezentantoj de la pola eklezio alportas diversajn verkojn: kodoj de Cicerono, verkoj de Petrarko kaj Boccacio. Pola kanceliero Zbigniew Oleśnicki fariĝas famega ĉe la imperiestra kortego kaj ĉe ĉiuj instruitaj homoj de Eŭropo.

Dume Kazimiro la granda en 1384 kreas krakovan Akademion laŭ la modelo de Bolonja Akademio. Gereĝoj Jadwiga kaj Jagiełło pliriĉigas novan Akademion je ĉiuj direktoj, invitas profesorojn el la lando kaj el eksterlando. La famo de l' Akademio disvastiĝas, el ĉiuj landoj alvenas studentoj: germanoj, svedoj, ĉeĥoj, hungaroj eĉ angloj. Inter aliaj prelegas sciencistoj: matematikisto Tomas Murner, Johano Wirdung, Aventinus, Gregorio el Sanok, konata pola humanisto, kiu antaŭas Bakonon de Verulamo. Ne malpli fama estas historiisto Długosz, kiu iĝas plej konata en Eŭropo inter la historiistoj dum XV jarcento.

Dum la sinodo ĉe Konstanco poloj ludas tre gravan rolon. Kune kun Zawisza Czarny, Boruta, Dunin, Balicki kaj Tuliszkowski, Paweł Włodkiewicz ili aperigis manifeston por liberigo de reformemulo Jan Hus. Katolika mondo tre malkontentiĝis pro tiu paŝo, sed niaj kuraĝaj defendantoj de la libereco klare anoncas al la tuta kultura mondo, ke nek per glavo nek per fajro oni decidus aferojn de la konscienco. Kontraŭ multaj kontraŭuloj la polaj reprezentantoj igas publikan elaŭskulton de la kulpigita Huso. Ĉio tio ne multe helpis, sed estas necese citi la nomojn de polaj defendantoj krom jam menciitaj: Laskarys-episkopo el Poznań, Zygmunt Korybut Kurdwanowski — episk. de Płock, Teodoro — princo de Ostrog, Mikołaj Trąba — episkopo de Gniezno, Jan Rzeszowski — epis. el Lwów, Piotr Kustynia — episk. de Wilno. Pariza Akademio post la diskonigo de la manifesto admiras ĝian enhavon, tiom progreseman, kaj laŭdegas la Krakovan Akademion.

Kiam aliaj landoj donacis al la mondo: arton de presado, horloĝojn, optikajn instrumentojn, eĉ pafistan pulvon, en Pollando prepariĝas tereno por la nova sunsistemo kaj malkovroj de Kopernik. Kastila reĝo Alfonso kaj arabaj skribistoj konstruis astronomiajn tabelojn, kiuj estis kritikitaj de Martin el Przemyśl kaj de Viena scienculo Perbach. Kalendaron dumtempe korektis la sama Martin el Przemyśl, sed akceptis ĝin nur post 65 jaroj papo Gregorio XIII. Do, la fundamentoj por Kopernik, estis jam pretigitaj speciale de lia instruisto ĉe la Krakova Akademio Wojciech el Brudzew. La verko de Kopernik aperis en 1543.

En skulptista arto famiĝis samtempe Wit Stwosz, kies verkaĵoj estas en krakova preĝejo de s-ta Mario kaj en la Wawela katedralo. Li poste loĝis en Nürnbergo kaj postlasis multajn verkojn en Germanujo.

Dum la tempo de ora epoko, en XV—XVII jarcento, Pollando estas plej potenca el ĉiuj landoj de Eŭropo. Oni eksportadis polan grenon al malproksimaj landoj: Anglujo, Hispanujo, Holando. Gdańsk (Danzigo) ĉiujare akceptis po 5000 ŝipoj. Popolaj lernejoj ekzistis proporcie en pli

granda nombro ol hodiaŭ, ĝis 600, kio respondas por 2500 unu lernejo, ĉar oni kalkulis la loĝantaron je unu kaj duono da milionoj. Kiom da justeco estis en tiamaĵ dekretoj, oni povas juĝi el tio, ke la reĝo Stefan Batory malpermesis preni la objektojn devenintajn el ŝiprompiĝoj. Oni devis helpi laŭ la povo al ŝippereanoj. Religiaj reformoj en aliaj landoj forprenadis milojn da viktimoj; Pollando ekceptas ĉiujn mizerulojn kaj forpelitojn. La nobelularo ĵuris dum la Varŝava konfederacio neniam verŝadi homan sangon sekve de aliaj konvinkoj aŭ aliaj religioj. En 1573 la sama nobelularo igas Henrikon Valois antaŭ ol li iĝis pola reĝo ĵuri la saman leĝon. Ili ja sciis, ke Henriko kun sia patrino Katarino kaj frato Karlo IX iniciatis la nokton de s-ta Bartolomeo. Francujo enkondukas similan liberalan edikton 25 jarojn poste kaj Anglujo komence de XVIII jarcento, Germanujo ĉe la fino de XVIII. La inkvizicio en Polujo neniam estis tiom severe efektivigita, fakte ĝi ĉesis samtempe, kiam Sigismundo Aŭgusto supreniris polan tronon. Nur en 1785 aperas unika kondamno de Niemirycz. En Francujo la inkvizicio finiĝis dum la granda revolucio; en Hispanujo malaperis laŭ ordono de Napoleono en 1808, sed estis renovigita kaj daŭris ĝis la 1834. La sama opinio regnas inter la nobelularo pri sorĉoj kaj sorĉistoj. Ili ne povas esti persekutitaj, se ne estas malutilaj al la socio.

La literaturo de XVI jc. havas kelkajn reprezentantojn de nacia lingvo. La unua estas Kochanowski. Unu el plej famaj literaturistoj estis Stanislao Hozjusz, nomita Granda Kardinalo. Papo Paŭlo la IV ofte petis konsilon de li pri diversaj gravaj demandoj. Dum la novekunvokita sinodo, kiun li prezidis, multaj partoprenantoj proponis lin post la morto de Papo lia sekvanto, kiel plej kapabla por tiu posteno. Pola scienculo kaj filozofa Modrzewski unua en Eŭropo proponas liberecon por kamparanoj kaj internaciajn juĝejoj, anstataŭ milito. Estis multaj elokventaj parolantoj, oratoroj, kiujn admiris Italoj, dum oni en 1554 proponis diskutadon je ĉiuj demandoj de teologio, ekz. Stan. Niegoszewski. Diversaj ŝtataj institucioj, ekz. Litova Statuto iĝis modelo por eŭropaj fakuloj. Pola kuracisto Józef Struś estis vokita de sultano Suliman por kuraci lin.

Sed alvenis malfacilaj tempoj, kiam oni devis batali kontraŭ najbarlandanoj, por savi sian liberecon. Moskvo, Svedlando, Teŭtona ordeno estis plej danĝeraj. Sed la progresa movado kulturema ne ĉesis. Oni bezonis taŭgajn militgvidantojn kaj oni ilin havis. Ĉu la liberigo de Vieno kaj de la Eŭropa kulturo ne estas sekvo de la militplano de la reĝo Sobieski? Estis ankaŭ aliaj multenombraj armeestroj, kiuj bataladis kaj samtempe faradis vojaĝajn malkovrojn kiel ekz. Arciszewski, partopreninto je bataloj de Holando kontraŭ Hispanujo en Brazilo.

Batalado nek estas por ni granda honoro nek ambicio, sed neceso. Se ni pri ĝi parolas, ni havas nur unu celon: nome montri, ke ĉiuj homaj pensoj kaj penadoj reflektiĝadis en Pollando same kiel aliloke. Ni ekz. priparolas nian lernejan fakon. Jam ni diris, ke en Polujo lernejoj estis sufiĉe multaj. En nia lando ekzistis io, kio povas esti konsiderata kiel unua ministerio de klerigado, nome Eduka komisiono fondita je la fino de XVIII jc. Ĝi estis modelo por Frederiko Vilhelmo la II kaj por Aleksandro, rusa imperiestro. Ŝtata reformo, nomita Konstitucio de la 3 de majo, estis multe pli progresa ol en iu ajn lando de Eŭropo. La nobelularo propravole donis al la tuta popolo liberecon. Germana filozofa Buss esprimis sian

admiron pri tiom progresema modela konstitucio. La nomoj de la reformatoroj estas konataj al ĉiuj, kiuj interesiĝis pri la progreso de homaro. Konarski, Kołłątaj, estas en ĉies memoro. Speciale la lasta esprimis ideojn, kiuj nur en la dua duono de XIX jrc. disvastiĝis en la progresema mondo de pedagogio kaj socia vivo.

Ni ne povas preterlasi ankoraŭ du nomojn de tiu epoko: Daniel Chodowiecki unu el plej famaj pentristoj — gravuristoj. Li postlasis pli ol 3.000 gravuraĵojn sur kupro. Pro lia talento li estis invitita direktoro de la Akademio de l' artoj en Berlino. Lavater, plej granda fakulo en tiu arto, en sia verko enmetas grandan vicon de gravuritaj vizaĝoj de Chodowiecki kiel modelon de admirinda arto.

La dua nomo estas tiu de Kościuszko, konata nacia heroo, kiu verkis faman militistan verkon pri manovroj de kavaleria artilerio. La verko estis tradukita anglalingven en 1808 de Williams kaj nomita de la generalo Davie plej kompleta kaj lerta verko en tiu direkto.

Post la dispartigo de la lando inter tri najbaraj monarkioj sekvis luktoj de la pola nacio kontraŭ perfortemuloj. Multe da sango estis verŝita kaj multaj fortoj estas perditaj. Sed Pollando ne ĉesis partopreni je la progreso de la homaro.

En Wilno estis kreita instituto de patrineco. Napoleono dum sia tramarŝo tra Wilno vizitis ĝin kaj post la reveno Parizon, laŭ tiu modelo kreis saman instituton Maternité en Parizo. En Warszawa estis kreita unua en Eŭropo politeknika instituto. Sed ĝi tuj estis fermita de la rusa registaro. Jędrzej Śniadecki, fama Wilna profesoro kaj filozofa, skribis sian verkon: Teorio de organizitaj kreitaĵoj, tradukitan germanlingven kaj franclingven. El tiu tempo estas citindaj nomoj de Hoene-Wroński, fama matematikisto, Lelewel historiozofo, Staszic geologo, Lotar Dargu profesoro de leĝoscienco kaj sociologo. Prof. Olszewski unua fluidigis oksigenon., Nencki faris multajn malkovrojn en la ĥemio fiziologia, Hirsfeld fama anatomiisto, Dybowski, esploristo de siberiaj tundroj, Baudoin de Courtenay lingvisto.

Oni povas citi multajn nomojn konatajn en diversaj direktoj de la homa kulturo, socia laboro kaj scienco. Kiu ne konas nomon de Chopin, genia muzikisto kaj komponisto, kiu polan muzikon disvastigis inter ĉiuj popoloj kaj nacioj de l' mondo. Kiu ne konas nomon de Sienkiewicz kaj lian Quo Vadis? Kiu ne konas pentraĵojn de Siemiradzki, Chełmoński, Kossak.

Kiu ne konas influon de Mickiewicz sur la milionojn da pensantaj homoj. Kiu fine ne konas geniajn laborojn de Skłodowska Curie? Kiu ne konas Paderewski?

Por fini ni akcentas ankoraŭ unu por ni esperantistoj plej valoran malkovron faritan sur la pola tero: estas la Zamenhofa lingvo jam disvastiĝanta sur la tutan terglobon kaj promesanta feliĉon por la tuta homaro. Feliĉon? dum paflegoj tondras kaj neniigas milojn da homaj vivoj, milojn da ekzistaĵoj, patrinoj kun infanetoj en la brakoj. Ĉu oni povas sonĝi pri la feliĉo?

Jes oni povas ne nur sonĝi sed efike kunagi, sed por tio necesas la interna Zamenhofa Ideo de amo kaj konkordema vivo de ĉiuj popoloj de l' homaro.

(Laŭ Melanja Czarkowska — Twórczość polska — Wilno 1922)

Chopin ekparolis.

Ce piano blindulo hungara eksidis
 Kaj komencis ludi. Ekestis silento.
 Ĉiujn en salono kaptis ia sento
 Kaj profunda kortuŝo. Li tion ne vidis.
 Melodio ekfluis el sub fingroj liaj.
 Aŭdiĝis ĉirkaŭe dolora ĝemspiro,
 Malĝojo kaj larmoj, plendo kaj sopiro.
 Ies anim' ekploris kaj melankoliaj
 Tonoj plenigis ĉambron. Ludis la blindulo...
 Aŭdiĝis mazurko, polonez', preludo,
 Lulkanto, sonato, jen ree etudo...
 Ni ĉiuj lin aŭskultis kun larm' en okulo.
 Ni ĉiuj estis kune, sed li sin izolis
 Kaj solece vagis en la land' mistera,
 Akompanis lin ia spirit' supertera.
 ...Pere de Imre Ungar Chopin ekparolis.

Halina Weinstein.

Varsovio, en marto 1932.

PRINCO JOZEFO PONIATOWSKI.

Vespere la batalo estis interrompita.

Neniaj esperoj restis. La stelo de Napoleono, iam brila, kiel la suno, nun estis paliĝanta. Ĝi paliĝis, pli ĝuste, apud la muroj de Moskvo, kvazaŭ timigus ĝin la flamoj de la brulego. Ĝiaj lastaj radioj lumigis la returnan vojon, longan vojon tra la glacioj kaj neĝoj de la vasta Rusujo — al Leipcigo.

Tie, apud Leipcigo, la stelo de Napoleono, baldaŭ tute estingiĝonta, flagretis siajn lastajn radiojn. La dio de milito defendis sin ankoraŭ, kiel leono, venkita de superanta forto, kaj kiel leono, antaŭ ol oni ĝin ligos per ŝnuroj kaj malliberigos en kaĝo je amuzo de homoj, li baraktis ankoraŭ, mordis kaj gratis.

En tiu momento, kiam unu post alia perfide forlasis lin malgrandanimaj timuloj, por serĉi protekton ĉe novaj dioj, la polaj regimentoj restis fidelaj.

Nur nun Napoleono ekkomprenis, kion signifis kaj valoris pola soldato. Nur antaŭ kelkaj semajnoj, apud la muregoj de Smoleńsk, li insultis princon Jozefon Poniatowski por la malgrandiĝo de liaj regimentoj, kvazaŭ ne en lia servo kaj ne por li tiel plorinde maldensiĝus la polaj vicoj. Hodiaŭ aliaj estis liaj pensoj. De kvar tagoj tiu iam insultita komandanto estis marŝalo de Francujo, de kvar tagoj li ĝuis tiun honoron, kiun antaŭ li ricevis en Francujo neniu alilandulo. Kaj nun, kiam la nokto elpuŝis armilojn el la manoj de la batalantoj, kiam kun dentoj kunpremitaj kaj malespero en la koro Napoleono rigardis en la estontecon, ankaŭ Poniatowski maldormis. Liaj pensoj estis doloraj.

Tiuj pensoj portis lin en la pasintecon. En la bildoj, kiujn la memoro pentris antaŭ liaj okuloj, li vidis sin amata kaj favorata nevo de la lasta pola reĝo. Li, la heroo de tiel multaj amaventuroj, ke li gajnis la titolon de la pola Don-Juano, vidis sin ĉe la genuoj de la ĉarma Karolino Thun en sia plej flama kaj eble la sole vera amo. La sekvanta bildo havis nigran fonon. Lia reĝa onklo perfidis la nacion, kaj tiu perfido brufermis ĉiujn pordojn antaŭ la nevo. En li, por kiu la honoro estis

ĉiam pli kara, ol la vivo, oni volis vidi nur kandidaton je perfidulo. Ĉu do mirinde estas, ke kiam la glavo estis elpuŝita el lia mano, li anstataŭis ĝin per pokalo, ke lia palaco iĝis scenejo de diboĉoj, por kiuj kondamnis lin multaj rapidjuĝaj Katonoj? Ĉu estas mirinde, ke kiam eksonis la voko de Napoleono, li respondis al ĝi kun duobla fervoro, vidante en li savon por la patrujo kaj savon por si mem? Li sekvis Napoleonon, fidela en bona kaj malbona sorto. Li havis nur unu honoron, kaj tiu honoro ne permesis, al li, kiel insistis varsoviaj politikistoj, forlasi post la rusa militiro la venkitan dion kaj perfide trapasi al la venkintoj. Eble li ne havis plu iluziojn pri Napoleono. Eble li konsciis jam, ke tiu adorata Marso havas nur ambiciajn celojn, ke libereco de nacioj estas nur logvorto en lia buŝo. Eble en la profundo de sia animo li riproĉis al Bonaparte, ke li delogis la polan nacion, kiel lerta tentisto delogas naivan knabinon. Kiu scias? El la buŝo de Poniatowski nenian eliris vorto de murmuro kontraŭ Napoleono. La venkiton ĉiuj povis perfide forlasi, ĉiuj, nur ne poloj. Ili havas nur unu honoron. Honoro! Al multaj ĝi ŝajnas vanta vorto. Kiam la honoro de la patrujo estas en konflikto kun la bono de la patrujo, kiu politikisto ne elektus la duan? Antaŭ kelkaj monatoj, kiam oni insistis je li de ĉiuj flankoj, kiam oni riproĉis al li, ke li pereigas la patrujon kaj la armeon, en lia animo baraktis diversaj sentoj; la maŝo jam ekkaptis pistolon, por per kuglo akiri al si eliron el la situacio, sed li venkis la tenton. Kiel ajn malfacila estis lia vojo, ĝi estis la sola vojo, sur kiu li povis paŝi kun levita kapo. Ĉiu alia kondukis en koton. Li ne hezitis plu: li restis fidela.

* * *

Nebula, oktobra nokto levis fine sian vualon de la tero, ruĝa de sango. La armeo de Napoleono estis returnanta. Vicoj post vicoj, ne, grupoj kaj amasoj, svarmantaj ĉiam pli senorde pasadis la ponton sur la rivero Plajso. Inter la returnantoj la polaj soldatoj estis en la lastaj. Ili havis ankoraŭ taskon: gardi la returnon de la granda armeo, defendi la reirantojn.

Amasoj marŝis, kuris kaj svarmis tra la ponto. Fine ili estis transe. Sur la batalbordo restis nur Poniatowski kun sia malgranda areto. Kaj en la momento, kiam la granda armeo jam estis pasinta, subite la tero kaj la aero ekstremis: oni eksplodigis la ponton.

Ĉu ĝi estis eraro de Napoleono, aŭ ago konscia? Ĉu lia menso, nekutima ankoraŭ al malvenkoj, konfuziĝis en la leipciga batalo, aŭ lia cerbo de politikisto diktis al li por la savo de la propra armeo perfide, lasi la polajn regimentojn en la manoj de la malamikoj?

Princo Jozefo saltigis la ĉevalon en la ondojn. Kugloj fajfis post li; unu trafis lin. Nebulo metis sin sur liajn okulojn, sed la oreloj restis surdaj je la petegoj de la ĉirkaŭantaj oficiroj, ke li savu sin mem kaj siajn soldatojn, kaj subiĝu. El liaj lipoj faladis responde nur vortoj pri patrujo kaj devo.

Trans Plajso tra kotaj kampoj kaj ĝardenoj al la alia rivero, Elstero. Denove fajfis la kugloj. Denove trafita, la princo falis duonsvene en la brakojn de sia adjutanto. „Subiĝu, subiĝu!“ — renoviĝis la insistoj. Sed per la lastaj fortoj li rektiĝis kaj surseliĝis. „Dio konfidis al mi la polan honoron — nur al Dio mi ĝin fordonos!“ Kun tiuj ĉi vortoj li puŝis la ĉevalon en Elsteron. Ankoraŭ unu kuglo — jam la lasta. Kun tra-

pafita pulmo, kun sango, ŝprucanta el la buŝo, li baraktis ankoraŭ dum momento, sed vane. Kovris lin la ondoj de Elstero.

* * *

Jarojn poste la falinta dio, sklavigita, kiel leono en kaĝo, sur la solecaj rokoj de S-ta Heleno, rememoradis sian aventurplenan vivon. El la amaso da bildoj aperis la persono de Poniatoski. Li rememoris lian neflekseblan honorecon, trankvilan dignon, vere princa majestecon. „Poniatoski estis vera reĝo — flustris al si mem Napoleono. — Li havis ĉiujn postuleblajn kvalitojn kaj talentojn — kaj tamen li silentis“.

L. Zam.

V. POLLANDA KONGRESO DE ESPERANTO.

LUBLIN, LA 15.—16. V. 1932.

En la lasta numero de „P. E.“ ni diskonigis la sciigon, ke nia landa Kongreso okazos nunjare en Lublin dum Pentekosto. Ni esperas, ke malgraŭ malbona ekonomia situacio en nia lando la Kongreso estos sufiĉe multenombra por inde prezenti nian movadon kaj samtempe fari propagandon de nia afero en la kongresurbo.

La Loka Komitato zorgas, ke ĉiu alveninta samideano estu kore akceptita en Lublin, ke li ricevu konvenan kaj malkaran loĝejon kaj li pasigu agrable la tempon. Ni penas ankaŭ akiri kutiman rabaton ĉe fervojoj.

Detala programo de la Kongreso estas en preparo kaj ĝi aperos en maja numero de „P. E.“, kiu estos preta almenaŭ unu semajnon antaŭ la Kongreso.

Aliĝojn kaj informojn pri ĉiuj aranĝoj donas: Pola Esperanto-Asocio, filio en Lublin, str. Przechodnia 2. Loka Kongresa Komitato.

KOMUNIKOJ DE P. E. D.

Kiel ni jam informis en la lasta komuniko, P. E. D. decidis komenci agadon por kolektado de subskriboj sur specialaj folioj, postulantaj enkondukon de Esperanto en lernejojn. La folioj estos post fino de kolektado binditaj en volumon, kiu kun speciala skribajo estos prezentita al ministro de klerigado. Laŭ nia intenco la kolektado devus esti finita en septembro kj. Se la rezulto de la agado ĝis la dato ne estos kontentiga, ni devos daŭrigi ĝin pluen.

La kolektadon komencis jam Kraków kaj Łódź. Pri aliaj urboj ni ricevis ĝis nun neniun sciigon, sed ni esperas, ke ili sekvos nian alvokon. Por unuecigi la agadon ni presigis specialajn foliojn. Ĉiu folio estas numerita de 1—50 por nur 50 subskriboj. Subskribantoj devas meti sian antaŭ- kaj familian nomon legeble, aldoni profesion aŭ titolon kaj precizan adreson.

Ni petas uzi nur foliojn de ni preparitajn por doni al la tutajo unuecan karakteron. Por kovro de pres- kaj sendkostoj pagu po 5 groŝoj por folio al konto P. K. O. 408.066 (J. Alfus, Kraków, Słoneczna 31).

Kiel jam anoncote okazos dum Pentekosto t. e. la 15—16 V. kj. VI. Konferenco de P. E. D. Ni atentigas la grupojn, ke iliaj reprezentantoj devas posedi oficialan rajtigilon, kiu servos kiel legitimilo por partopreno en kunsidoj de la Konferenco. Ni ankoraŭfoje petas pagi la kotizon, ĉar la nepagintoj ne povos partopreni en la voĉdonado.

Ekzekutiva Komitato de P. E. D.

POLLANDA KRONIKO.

BYDGOSZCZ. Vigliĝo de la movado. Januaran kunvenon de Societo Esperanto ĉeestis 150, februaran 180 personoj. Ankaŭ la kunveno de Scienca Esperanta Rondo estis tre bona vizitata. En la riĉa programo de ambaŭ societoj konsistanta el muzikajoj, Esperantaj paroladoj kaj humorajoj ktp. partoprenis ĉiufoje negro-samideano Kola Ajayi per esperantlingvaj parolado kaj afrikaj kantoj en la Joruba-lingvo. La du grupoj eldonas modestan organon „Ligilo“ kun ĉiuj informoj pri la loka movado. La grupoj enkondukis samspecan stelon por ĉiuj Esperantistoj en Bydgoszcz kaj starigis kartotekan adresaron de lokaj samideanoj kaj

simpatiantoj. Ĉe-metodan kurson gvidas prof. Sygnarski. Superan kurson kun 60 partoprenantoj gvidas s-ro Edmund Fethke. Esperanto instruata kaj praktikata en 6 lernejoj.

FONDO de „Esperanta Rondo ĉe Ŝtata Klasika Gimnazio“ okazis la 4. III. 1932. La kunvenon ĉeestis 35 lernantoj de la gimnazio. Gvidas s-ano Władysław Sygnarski, la filo de nia fervora prof. Miecz. Sygnarski. Oni elektis estraron konsistantan el: s-roj Wład. Sygnarski — prezidanto, Dominiczak — vicprezidanto, Puczyński — sekretario, Krasicki — kasisto, Patalong — bibliotekisto. Protektanto de la grupo prof. M. Sygnarski. Oni decidis kunveni dufoje en la monato, vendrede je 16.30. En la programo estas prelegoj kaj deklamoj.

CZORTKÓW. La membroj de la ĉi-tiea societo „Verda-Stelo“ aranĝis sabate la 19-an de marto solenan adiaŭan vesperon honore al la meritplena s-ino Leonja Frucht, rajtigita Ĉe-metoda instruistino. La karaktero de la vespero estis ne nur solena sed ankaŭ kortuŝa. S-ro H. Oberländer v. Sternberg del. de U. E. A. citante la meritojn de s-ino L. Frucht sur la kampo de internacia Esperanta movado esprimis al ŝi en la nomo de ĉiuj lernintoj la plej koran dankon kaj bondeziron. Poste s-ro N. Stöckel eldiris samkarakteran paroladon kiu ege kortuŝis la tutan ĉeestantaron. S-anino Frucht per belaj vortaj respondis kaj dankis al ambaŭ parolintoj. Post la oficiala solena parto de la vespero sekvis dancoj kaj amuzoj, kiuj daŭris ĝis la matena krepusko. La sekvintan tagon s-anino L. Frucht forveturis en najbaram urbon, Buczacz por tie fari kursojn, akompanita de ĉiuj lernintoj, kiuj ĉe la ekmoviĝo de la vagcnaro koreĝe adiaŭis ŝin per entuziasmaj vivokrioj.

CHORZÓW. Jarkunveno de Societo „Esperanto“ okazis la 20. III. 1932. Akceptinte raporton de malnova estraro oni elektis novan estraron. Prez. s-ro Staniek W., Vicprez. s-ro Czaja K., Sekretario s-ro Pogoda A., Vicsekr. s-ro Deja Czesław, Kasisto s-ro Bywalec T., Vickasisto s-ro Jaroń P., Bibliotekisto s-ro Kołodziej.

Okazas regulaj ekzercvesperoj de la membroj kaj senpaga kurso kun 20 pers., gvidata de la fervora kursgvidanto sam. Deja laŭ senpera metodo. Monata kunveno okazas la ĉiun unuan vendredon de la monato en la gastejo ĉe s-ro Morcinek, ul. Szkolna 15. Skribajojn oni sendu al la prez. sam. Staniek W. Chorzów, ul. Kalusa 5.

KATOWICE. La Societo de Esperanto-Amikoj okazigis la 9-an de Aprilo sian ĝeneralan kunvenon en la grandrestoracio. La novelekto de la estraro rezultigis jene: Prezidanto s-ro Faruga; Vicprezidanto s-ro Tichawski; Sekretario s-ro Kloss; Vicsekretario s-ro Rosenzweig; Kasisto s-ro Kania; Bibliotekisto s-ro Kostka; Konsilantoj s-roj Leuschner kaj Zug. La Societo aranĝis en la pasinta jaro du kursojn por komencantoj. La dua kurso, gvidita de samideano Faruga daŭris de 16 IX. ĝis 15-a XII. kaj bone sukcesis, komencis ĝin 48 personoj, finis 36. La biblioteko posedas 139 librojn. La societjaro komenciĝis kun saldo de 664,12 Zlotoj. — La 24 II. 1932 vizitis nian Societon la fame konata poeto Julio Baghy, traveturante Parizon.

KRAKÓW. Merkrede, la deksekan de marto okazis „Viva jurnalo“ aranĝita de Pola Esperanto-Klubo. — La unua parolis tre gaje konferansjero D-ro Wiewiórowski, de unua momento farante treege gajan agordon inter la publiko. Li estas jam bone konata de Esperanta Kabaredo, en kiu li kantis ĉarme kaj plensukcese, kun grandioza mimiko. Poste S-o Direkt. Kuhl legis spritan novelon pri jurnalistoj. Sekvis lin S-o Hodakowski, legante gajan novelon. Feljetonon havis f-ino Irena Szczepańska sub titolo: „Ĉu rido estas peko“. Post ŝi deklamis s-o Kriss sian tre gajan poemon. S-ino Barbaszewska, bonege konata de esperanta publiko pro aranĝado de Esperanta kabaredo, en kiu ŝi kantis grandsukcese, tralegis siajn mallongajn sed tre spritajn poemetojn. Ĉiuj ĝojis kaj aplaudis, kiam dro. Wiewiórowski parolis pri la virina modo. Ridegoj kaj aplaŭdoj dankis al li. Ing. Gostyński legis novelon pri kino. S-ino Szczepańska tralegis tre interesan kronikon de esperanta movado. Finis tiun plensukcesan vesperon fraŭlino Ĉwiklińska, traleginte spritan recenzon el „Esperanta Balo“.

KRÓLEWSKA HUTA. La 17. IV. okazis Ligo-kunveno en Dom Polski, ul. Wolności 64, al kiu ĉiuj Esp. grupoj de Silezio estis invitataj.

LUBLIN. La 17. III. k. j. okazis en bela ejo de „Stowarzyszenie Kupców Polskich“ jarkunveno de loka P. E. A. grupo. Post raporto de Prezidanto pri agado de la Societo dum pasinta jaro kaj de Revizia Komisiono pri stato de

kaso oni unuanime elektis la sekvantan Estraron: S-ro Seweryn Sadowski — Prezidanto, S-ro L. Leszczyński — Vic-Prezidanto, S-ro Cz. Pruski — Sekretario, S-ro K. Scibior — Kasisto, S-ro Marcin Posch — Bibliotekisto, F-ino M. Dąbrowianka kaj F-ino K. Obroślińska — Komitatanoj. — En Revizian Komisionon eniris: S-ro B. Drzewiecki, St. Radzimiński kaj B. Stankiewicz. — Loka Delegito de U. E. A. gvidas kurson de Esperanto por 30 p. en ejo de „Gimnazjum Humanistyczne“ (por plenkreskuloj) kaj en gimnazio „Szkoła Lubelska“ specialan kurson por 10 gimnazianoj.

Dum marto vizitis nin tri aliurbaj samideanoj: S-ro B. Żmuda, Del. de U. E. A. en Siedlce, S-ro T. Pleskaczyński el Warszawa kaj S-ro D-ro J. Mędrkiewicz el Chojnice (Pomeranio). — Lublina esperantistaro gastigos en siaj muroj multnombrajn samideanojn dum Pentekosto okaze de V. Tutpoluja Esperantista Kongreso.

Aranĝita de Juda Landkonema Societo senpaga 10-taga kurso de Esperanto kontentige finiĝis kun pli ol 50 aŭskultantoj. La kurson gvidis s-ro Cz. Pruski, Del. de U. E. A. laŭ metodo de pastro A. Cseh. — La 8-an III. k. j. okazis solena malfermo de plena 3-monata kurso, gvidata de la sama instruanto por pli ol 30 personoj laŭ lernolibro de Cart kaj Borel. — Juda tagjurnalo „Tugblatt“ favore rilatas al esperanta movado. — Pola „Junulara Esperantista Rondo“ en gimnazio „Szkoła Lubelska“ atendas dum Pentekosto k. j. alvenon de multaj gekolegoj. —

LWÓW. Grandajn kaj belajn tagojn travivis en marto lvovaj esperantistoj. Venis nian urbon fenomenaj, hungara pianisto s-ro Imre Ungar, laŭreato de Soppen-konkurso en Varsovio.

Blinda pianisto, kiu dank' al helpo de varsoviaj samideanoj venis Polujon kaj venkis mirinde, per sia granda talento, malgraŭ forta konkurenco de seriozaj pianistoj el preskaŭ tuta mondo, — venis, por ankaŭ en nia urbo ricevi grandegajn sukcesojn. Je la stacidomo atendis kaj salutis kore la agrablan gaston - niaj gesocietanoj. Du koncertoj, kiujn donis Imre Ungar, havis grandegan sukceson, ovacioj, post ĉiuj numeroj de programo — estis senfinaj. Dum unua koncerto, nia societo oferis al juna majstro-belan arĝentan kronon, kun esperanta surskribo. Tio ĉi tre plaĉis al publiko kaj preskaŭ en ĉiuj gazetoj en koncertrecenzoj estis rimarkoj pri donaco de „lvovaj esperantistoj“. Okazis ankaŭ intervjuoj kun s-ro Ungar, dum kiuj li ĉiam akcentis sian esperantistecon kaj esprimis sincerajn dankojn al polaj esperantistoj.

La sekvontan tagon post koncerto s-ro Ungar vizitis oficiale nian societon. Post kora salutparolado de dro Fels, prezidanto de lvova societo, bele respondis, kortuŝita, juna kaj jam tiel fama pianisto.

Projektita esperanta parolado de Ungar per lvova radio-stacio bedaŭrinde ne okazis, ĉar s-ro Ungar neatendite devis forveturi al Varsovio alvokita per telegramo. Tamen ni, lvovaj samideanoj ne perdas esperon, ke s-ro Ungar revenos ankoraŭ al ni kaj la parolado okazos.

WARSAWA. La 17-an de Marto 1932, ĉe la Unuiĝo de la Polaj Ŝtatservojistoj, Aleje Jerozolimskie 101, okazis la ĝenerala Jarkunveno de la Pola Esperanta Asocio. Konstatinte la sinoferan kaj senlacan laboremon de la Komitato, la kunvenintoj aplaŭde reelektis ĝin, kun kelkaj ŝanĝoj en la postenoj, post interkonsento de la interesitaj personoj. Jen la konsisto de la Komitato: Pr.: Piotr Nowakowski, Bibliot.: Feliks Falkowski, Sekr.: Anna Grabowska, Kas.: Wacław Falkowski, Bibliot.: Roman Ignaciuk, Anstataŭantoj-helpantoj: Dr. Janina Endorówna, Kazimiera Sowińska, Janina Burkathówna. Kontrola Komisiono: Marja Zarzecka, Prof. Mieczysław Kaus, Kazimierz Zajączkowski. S-ino Cense rifuzis la proponitajn postenojn, sed deklaris sin preta daŭrigi la laboron kaj helpon. Krom la gvidado de kursoj, S-ino Cense akceptis la organizon de la programoj por la jaŭdaj vesperoj. Pri la tevesperoj F-inoj Janina Burkath kaj Antonina Zalewska akceptis la kunlaboron. Ĉiuj akceptis la postenojn difinitajn kaj promesis labori por la sukceso de la Esperanta ideo.

En la nova sidejo: Aleje Jerozolimskie 101, Unuiĝo de la Polaj Ŝtatservojistoj, (Propra domo) Pola Esperanto Asocio funkcias kiel sekvas: 4 fojojn semajne, de la 20—22-a horo: marde kaj vendrede: kursoj; Merkrede: Kunveno de la Komitato, Jaŭde: Vesperdiskutoj (teoj, amuzvesperoj) Biblioteko.

25/II. okazis belega koncerto por TEKA-anoj aranĝita de Doktoredzino S-ino Wysokińska. Prof. Ardati kantis esperantlingve. Ankaŭ f-ino Muszkatblat

kantis belegajn kantojn de Moniuszko. S-ro Jarecki priparolis disvastigadon kaj valoron de Esperanto.

Dro W. Róbin prezidanto de TEKA iniciatis petskribon al la ĉefa Kuracista Cambro sub la prezido de Ministro Chodźko, koncerne la uzadon de Esper. en medicinaj fakrevuoj. La peto estas akceptita sen iu ajn kontraŭdiro.

WILNO. 1) La Esperanto-Klubo de „Vilna Juda Kleriga Societo „Vilbig“, kiu fariĝis la centro de la E.-movado en nia urbo, gastigis en monato Januaro unu el la pioniroj de nia movado, la antaŭmilitan Prezidanton de la Vladivostoka Esp. Societo, juĝiston Rajnoldon Vonago, kiu faris paroladon en nia klubejo pri siaj dummilitaj vojaĝoj al Japanujo, vizitado al japanaj militkaptejoj, ekkona-tiĝo tie kun Julio Baghy k. a. esperantistoj, pri siaj diversaj travivaĵoj, konatiĝo kun eminentaj japanaj samideanoj, lia loĝado en Japanujo dum pli ol tuta jaro dank' al klopodoj de japanaj s-noj k. a. — La interesa prelego, legita en Esperanto estis tuj surloke pofraze tradukita judlingven de nia malnova s-no K. Geršater. La ĉeestantaro, kiu kun granda intereso aŭdis la prelegon, varmege aplaŭdis kaj dankis la afablan gaston por liaj interesaj rememoroj. — Ĉeestis ĉiuj klubanoj kaj novkursanoj. La ĉi-tiea gazetaro poste raportis pri tiu-ĉi interesa prelego. — Al amiko R. Vonago nia klubo esprimas plej koran dankon!

2) En Februaro n. j. la „Esperanto-Klubo de „Vilbig“ okazigis interesan propagandan eksperimenton: En la daŭro de 2 horoj s-ro K. Geršater, Del. U. E. A. klarigis al la kelkcentthoma ĉeestantaro la tutan sistemon kaj konstruon de la lingvo Esperanto (la gramatikon, afiksojn kun ekzemploj). Post la antaŭa enkonduka parolado pri E. kaj nia ideo, tiu-ĉi nova por ni eksperimento elvokis eĝan intereson ĉe la ĉi-tiea inteligentularo kaj junularo. Kelkaj aŭskultintoj tiom konvinkiĝis pri la vera facileco kaj logikeco de E., ke ili decidis studi E. ne en la aranĝota tuj nova kurso, sed meminstrue, sen instruanto. — La nova kurso sia-vice komenciĝis (VII-a) sur la gvidado de F-no Eugenio Nahemen.

RECENZOJ.

Kalendaron kun semajnaj folioj eldonis **Heroldo de Esperanto, Köln.** Sur ĉiu karto troviĝas bonegaj humorajoj, kaj tial, aĉetinte ĝin, vi povas ridi la tutan jaron, kaj ankaŭ serioze propagandi Esperanton.

JUNECO KAJ AMO. Legendo el Venecio, verkita de **E. S. Payson.**

Eldonita de The Esperanto Publishing Company Lmt. Londono, 1930. En melankolia romaneto, inkrustita per ĉarmaj, originalaj priskriboj de l' itala naturreleco, plektiĝas la ĉiam aktuala temo: amo kaj amikeco. Du „ĝismortaj“ amikoj, Pietro kaj Georgo, kaj... ŝi la kunamatino, Reĝino, ...sed pli bone estus, se vi mem legus tiun interesan libreton, por pasigi agrable kelkan liberan tempon!

ROSETOJ. Poemaro de **Adalberto Smit.** Hago-Nederlando, 1930.

Ĉarmaj, flustilaj kaj melodiaj rimoj, en kiuj pulsas kaj traversiĝas la vivo! Jen amo pasia, jen ironia satiro, jen „Naturamika kanto“, jen kelkaj vortludoj, unuvorte diversajoj ĉarmkolore pentritaj.

DR. LEOPOLD DREHER, L. K.: Supera kurso de Esperanto. Dua eldono.

Jen tre valora libreto por ĉiu serioza Esp-isto, kiu deziras ne esti ĉiama komencanto, sed perfekta konanto de la lingvo. Diversaj gramatikajoj estas prezentitaj kaj klarigitaj per multaj interesaj ekzemploj, logantaj por legi. Kompare al la unua eldono ni ne rimarkis iajn ŝanĝojn. Aperigo de la verketo en tiel malfacilaj tempoj plej bone atestas pri ĝia bezono.

JULIO BAGHY: Dancu, marionetoj! novelaro, eldono de la aŭtoro. Budapeŝt 1927.

La libro konsistas el 11 bonaj kaj tre belaj noveloj. Baghy amas la homaron kaj li montras al ni, ke en la koro de ĉiu, ĉu tio estas homo klera, ĉu simpla vilaĝano, ĉu kruela ĝendarmo aŭ eĉ malĉastulino, dormetas ia bona sento, kiu montras kompaton aŭ sinoferon, kiam bezonas ĝin ies malfeliĉo aŭ feliĉo. — Sed la homoj estas sklavo de superstiĉoj, marionetoj, kiuj dancas je la ludo de aliaj, super ili starantaj. La politikistoj, generaloj ordonas, kaj homoj, fratoj kiuj nenion havas kontraŭ si, iras mortigadi sin reciproke en la plej terura buĉejo, kiu estas la milito. — Inter, aliaj estas ankaŭ humorplena rakonto pri unu kaptito kiu instruis esperanton kredigante al sia lernanto, ke li lernas la anglan lingvon. Krom la enhavo, rekomendas la libron bone konata de liaj legantoj, bela stilo de Baghy.

Han—ka.

STELLAN ENGHOLM: „Al Torento“. Heroldo de Esperanto Köln, Germanujo.

Konata estas la fakto, ke granda abismo estas inter la infanaj revoj, infanmondo kaj la vera, inter la idealo kaj efektiveco, inter diro kaj faro. Tamen homoj, sciante tion, ne povas konsentiĝi kun tio. Kiel suferis la juna Karlo, vidante ke la socialismo estas nura frazeologio, ke la anoj estas bonaj balotantoj kaj legantoj de revuoj — sed „frateco“ estas por ili interne fremda esprimo, ĉar iliaj personaj aferoj kaj vivo estas por ili pli gravaj al la idealaj fratoj. Li vidis kaj sentis ke la ekstera kuniĝo nenion valoras, ĉar la homoj ne konas sin reciproke, ne sentas la sentojn de aliaj kaj austataŭ frateco oni trovas inter homoj fremdecon kaj rigidecon. La senkompata vivo donis al li unu vangofrapon post alia, lia amata ideala Enjo estis amatino de alia. Longe luktis en li amo, envio, naŭzo kaj homa sento de l' kompatato ĝis li venkis la superstiĉon por kune kun Enjo provi plibonigi la vivon kaj atendi novajn surprizojn. Bonege skizita estas la karaktero de Karlo, kaj lia profunda pensdisvoligo. Nuntempa, saĝa, bona Enjo imponas per sia forta necedema naturo. La fono de l' naturo kaj ĝia komparo kun la vivo vigligas kaj plibeligas tiun psikologian noveleto.

R. M.

PRETER LA VIVO, Poemaro de **Julio Baghy**, Dua eldono, de Literatura Mondo, 1931, Budapest.

La libreto estas malgranda kaj maldika, tamen ĝia enhavo estas riĉa. — Ĝi konsistas el poemoj, foje pli longaj, foje nur kelkliniaj, sed Baghy scias eĉ en la plej mallonga verseto multon esprimi. — Ofte tia verseto ŝajnas esti eta fragmento, el la vivo elprenita. — La poemoj estas verkitaj diverstempe kaj diversloke: en Berezovka, en Nikolsk-Ussurijsk, en Singapuro, sur la maro ktp. tial ili estas tre diversspecaj. Ili dividiĝas je kvar ĉefaj partoj: „Tra Siberio“ „Tra l' oceanoj“, „Ĉe la ruinoj“ kaj „Kantantaj kordoj“. — Baghy scias enrigardi en la plej profundajn erojn de l' homa koro kaj animo, li scias legi, la homajn sentojn, klare kaj sincere li ilin pentras en siaj poemoj. — Belega estas la verso: „Homo, serĉu la homecon“, ĝi estas alparolo al la homo, kiu dum la milito pro batalemo kaj avido tute estiĝis. „Ĉu ne honte por krono de kreo sklaviĝi ĝis sentoj de bestoj, diboĉi triumfe dum festoj, kiujn baptis fratsango, mortveo, Vi preĝante Dion, neas Lin, kun blasfemaj sentoj en la sin'. Homo serĉu la homecon“. „La Sableroj“ enhavas multajn trafajn rimarkojn pri la vivo. — Preskaŭ ĉiu verso estas por si mem menciinda, sed la libro enhavas tro grandan kvanton da ili, por povi ilin ĉi-loke mencii, tial estas rekomendinde, ke ĉiu esperantisto mem legu tiun libron, por konvinkiĝi pri ĝia valoro.

Ewa B.

Eldona Societo Esperanto Stockholm Svedujo. Ŝlosilo de Esperanto.

En malpli ol du jaroj vendinte 20000 ŝlosilojn la sveda eldonejo esp. reeldonis ĝin en 20.000 ekz. La nova eldono estas tute novkompostita kun novaj kliŝoj. La vortaro estas iom pliriĉigita. La nova ŝlosilo donas tre agrablan impreson pro siaj bona papero kaj luksa eldono.

Sten Bergman, Tra sovaĝa Kamĉatko. El la sveda tradukis Birger Gerdma. 276 paĝ. Prezo broŝ. sved. kron. 4.50.

Norde de Japanujo situas la duoninsulo Kamĉatko kun multaj vulkanoj grandegaj arbaroj kaj vastaj tundroj. Multegaj salmoj en riveroj, felbestoj en arbaroj, estas abunda materialo por fiŝkaptado kaj ĉasado por kamĉatkoj, lamutoj kaj korjako. La aŭtoro kun sia edzino travojaĝis tiun landon de mordanta frosto kaj neĝostormoj, ofte riskante la vivon por idealaj celoj de esploro. La ekspedicio alportis al sia lando valoregajn objektojn sciencajn. Intereseĝaj rakontoj pri la aventuroj trovis en ĉiuj landoj grandegan atenton kaj la libro aperis en 12 lingvoj.

Estas vere unuaranga verko en moderna vojaĝliteraturo tre rekomendinda por ĉiuj esp. bibliotekoj de la inteligenta mondo.

Estas menciinde, ke la libro estas eldonita lukse sur bona papero kaj belege ilustrita.

Varna la Reĝino de la Nigra Maro. Belega gvidfolio por viziti Bulgarujon. Eldono de la Urbestro de Varna.

La IX Tutokola Kongreso en Praha 1932. Alvoko al la partopreno en Praha dum 26 de junio kaj 2—6 julio je gimnastaj ekzercoj de junularo.

Bulteno de Tutmonda Unio de Kolektantoj en Pollando. Władysław Łęka-wski, Warszawa, Ul. Krasińskiego 16. m. 156. Kolektas artikolojn pri kolektado de poŝtmarkoj. Petu statutojn.

EL LA GAZETARO. RICEVITAJ GAZETOJ.

El ricevitaĵ gazetoj en la unua vico devas esti menciita — nun antaŭ la 24-a Kongreso — La Gazeto de la XXIV, kiu regule aperas sub la lerta gvidado de nia aminda samideano Ĉefredaktoro Raymond Schwartz kaj teknika Direktoro L. N. Newell. Ĉu ĝi povas esti ne interesa? neeble. Ĉu la kongreso ne estos plej brila inter la Parizanoj, kiuj estas ĉiam ĝajaj homoj? ankaŭ neeble. Do aliĝu al tiu brila Kongreso. Nia redaktoro donas ĉi tie bonan ekzemplon aliĝante samtempe.

La Movado, aprila n-ro sciigas al ni, ke la Prezidanto de la Respubliko S-ro Paul Doumer akceptis la Honoran Prezidantecon de la Kongreso.

Germana Esperantisto interalie sciigas pri la kondiĉoj de la Karavano al la Kongreso. Gvidos konata samideano kaj gvidanto s-ro Fr. Ellersiek.

Heroldo de Esperanto aperigas ĉiam tre interesajn artikolojn. En la mar-ta n-ro ĝi priskribas mallonge sed treege interese la vivon de germana geniulo J. W. Goethe.

Volkszeitung, eldonata en Bydgoszcz ofte sciigas sian legantaron pri progresoj de la Movado esp.

Bulgara Esperantisto sciigas, ke dro Dimitro Gravinski en sia gimnazio en Sofia enkondukis devigan instruadon de E.

Esperanto Tidningen (La Espero) sciigas pri treege vizitataj kursoj de Jean Forge en Boras.

Nederlanda Esp-o citas 5 urbojn kun treege vizitataj Cseh-kursoj en la lando. La loĝantaro esperantiĝas rapide.

Radio Esperanto jam havas 500 subskribintojn. Kongreso en Cannes decidis, ke estonte lingvo internacia por radio estos Esperanto.

Lingvo Internacia. Greka gazeto skribas eble tro multe greklingve.

Intern. Pedagogia Revuo alvokas ĉiujn samideanojn por la subteno de Intern. Pedagogia Muzeo ĉe Mainz (Germanujo), kie estos aranĝita Esp-o Ĉambro. Jam estas 100 ĉambroj por ĉiuj landoj. Estas dezirataj lernolibroj, vortaroj, kopioj de dekretoj pri E. Sendu tuj materialon!

Bulteno de Intern. Scienca As., fariĝas pli kaj pli interesa, enhavante multajn sciencajn artikolojn. Jen la titoloj: La propago de la radioelektraj ondoj sur la surfaco de la tero. Temperaturo de steloj. Esperanto kaj progresigo de sciencoj.

Lingva Kritiko nov-eldonata gazeto en Roma, via Dandolo 24. Gvidanto prof. Migliorini. Kolektas regulojn de konsilanta gramatiko.

La Nova Epoko, eldonata de Sennaciulo, n-ro I. enhavas kelkajn vere interesajn artikolojn. Oni povas ne konsenti, sed oni devas pripensi.

Esperantistul, suplemento al Marea Noastra, eldonata de Dim. Mincev.

La Juna Batalanto preparolas la movadon de la katolika junularo.

Intersteno, Instituto de Internac. Stenografio, Duisburg, Friedenstr. 79.

Alvoko al la tutmondo kontraŭ la Japana buĉado en Manĉurio, indas pli detalan preparoladon. Agoj de perforto estas honto por civilizacio. Subskribis Universitata Ligo Kuo Min. Univers., Canton Ĥinujo.

La Espero eld. Hankoa Esp. Asocio. Oni festis Zamenhofan naskiĝtagon en Ĉinujo.

Esperanto, Int. Revuo de UEA, Ĝenevo. Jen la bildo de Eŭropo laŭ Privat, kiu havis okazon kompari orienton kun okcidento dum sia vojaĝo Hindujojn: Perdinte la grandecon de la famo, Eŭropo denove aspektas nur malvasta angulo de la mondo suferanta kaj batalanta. Simpation de ceteraj kontinentoj ĝi regajnos nur, se ĝi lernos rasan modestecon, rezignon je trudemo kaj uzon de sia pensa lerteco al problemoj de homa vivo kaj harmonio. Cetere kiel ĉiam vere interesa kaj profundpensa enhavo.

Ondo de Daŭgava, Latvio-Riga. Enhavo interesa. E. movado kreskas.

Poczta, pollingva organo de poŝt-telegr. kaj telef.-oficistoj. Propagas Esp.

Utrechta Esperantisto. Interesa rakonto pri flandraj nomoj.

Berna Heroldo. Bern Svislando.

Renkonte al la suno. Org. de Mariavita Ligo.

Espero Katolika. Intern. Monata Gazeto. Collet Hispanujo.

Esperanto Kiboŝa Tokio. La lastaj n-roj estas evidente destinitaj por komencantoj, kaj enhavas tre bone kolektitajn malgrandajn rakontojn kaj diskursojn.

La Revuo Orienta. Japana Esp. Instituto enhavas lingvajn respondojn, kelkajn recenzojn, bedaŭrinde en japana lingvo, do ne atingebla por esperantistoj alilingvaj. Krome kelkaj tre taŭge elektitaj bonstilaj rakontoj.

ESPERANTO EKSTERLANDE.

KARWINA. Ĉeĥoslovakujo. (Kursoj de esperanto).

La 21 de marto okazis la lasta leciono de la 3-monata esperanto-kurso, organizita de la Memeduka Rondeto de Macierz Szkolna en Karwina. Aliĝis 55 personoj, finis 38. Meza nombro de partoprenintoj estis 47. La kurson gvidis s-ro Rud. Z. Kobiela, konsuleja oficisto. — La 4. de aprilo komenciĝis nova kurso de esperanto por progresintoj, kiun gvidas s-ro Rud. Z. Kobiela. Aliĝis ĝis nun 31 personoj. — Kuraĝigita per la sukcesplena publika diskuto pri lingvo internacia, la pola urba kleriga komisiono organizas novan kurson de esperanto por la komencantoj. La kurson gvidos s-ro pastro K. Maultz. Aliĝis jam pli ol 30 personoj. — La 10 de aprilo okazis en Karwina kunveno de sileziaj esperantistoj, kunvokita de la Regiona Esperantista Ligo. En la programo estis paroladoj al la finintoj de esper. kurso, prelego pri Gdynia kaj Balta maro kun lumbildoj kaj amuza parto.

ENKETO PRI INTERLERNEJA ESPERANTO-KORESPONDADO.

La Delegito por Eksterlando de Itala Esperanto Movado estas kolektanta rezultojn akireblajn per korespondado esperantlingva inter ĝelernantoj de mezgradaj kaj superaj lernejoj el la tuta mondo, rilatantaj ĝeneralan kulturon (sciencojn, historion, geografion, pedagogion, manlaborojn, k. t. p.).

La rezultoj de l' enketo celas propagandi por Esperanto, precipe ĉe altrangaj oficialaj instruistaj rondoj, montrante al neesperantistoj la grandan pedagogian valoron de l' internacia helpa lingvo por ĉia kulturo.

Geinstruistoj de Esperanto bonvolu skribi pri siaj spertoj en interlerneja korespondado al la „Delegito por eksterlando de Itala Esperanto Movado“: Prof. Gaetano Facchi, al la adreso de lia oficejo: Esperanto Centro — Galleria V. Z. 92 — MILANO aŭ al lia persona adreso: Corso V. E. 64 — BRESCIA.



UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

POLA TERITORIO. Ĉefdelegito: J. Szapiro, Marszałka Piłsudskiego 33. Białystok.

Konto ĉe PKO No 60.047.

OFICIALA BULTENO No 26.

NEREPAGINTOJ. Kiel kutime, la aprilan numeron de „Esperanto“ ricevos nur Membro-Abonantoj, repagintaj sian kotizon por la jaro 1932. Por eviti interrompon en la ricevo de la gazeto, bonvolu tial afable pagi vian kotizon al la Delegito en via loko aŭ rekte al la Ĉefdelegito (konto PKO No 60.047). Ankaŭ ĉiuj aliaj membroj bonvolu rapide sendi sian kotizon, precipe pro la preparataj jam nun adresoj por dissendo de la nova Jarlibro, baldaŭ aperonta. Membroj dezirantaj prokraston aŭ partopagadon, bonvolu informi pri tio la Ĉefdelegiton per la loka Delegito aŭ senpere.

„POLA ESPERANTISTO“. Ni denove atentigas, ke Membro-Abonantoj, Subtenantoj kaj Dumvivaj Membroj rajtas ricevi „Polan Esperantiston“ por favora abonprezo Zl. 5.— jare (anstataŭ Zl. 8.—). Por la jaro 1932 eluzis tiun rajton jam 66 membroj. La rabatitan abonprezon Zl. 5.— bonvolu pagi, ĉu samtempe kun la kotizo, ĉu aparte, al la loka Delegito aŭ al Ĉefdelegito, indikante samtempe vian membronumeron de UEA. La administracio de „Pola Esperantisto“ ne akceptas rektajn rabatitajn pagojn de UEA-membraro.

PREMIOJ POR FRUPAGO. Aro da membroj malgraŭ niaj demandoj ne informis nin, kiun premion ili elektas. Ni atentigas, ke nun jenaj numeroj estas elĉerpitaj: 2, 3, 5, 7, 13, 20, 21, 22, 24. Premio No 25 estas konsentata nur por varbado de unu Subtenanto aŭ de du Membro-Abonantoj, sed ne por frupago. Ni petas rapide sciigi al ni pri sia elekto. Ne ricevinte respondon ĝis 1-a de Majo, ni ekspedos al la koncernaj membroj premion laŭ nia elekto.

PREMIOJ POR VARBADO. Premioj por varbado de novaj membroj estas parte jam dissenditaj, parte estos ekspeditaj dum monato Aprilo. Membroj, varbintaj novajn membrojn, kiuj ĝis nun ne elektis premiojn por varbado bonvolu rapide informi pri tio la Ĉefdelegiton.

NOVAJ MEMBROJ. Nunjare la Centra Oficejo konsentis doni premiojn al ĈIUJ novaj Membroj. Ili rajtas elekti unu premion el la jenaj numeroj laŭ la publikita listo: 4, 6, 8, 11, 15, 16, 19, aŭ 23. Ankaŭ la varbintoj rajtas elekti unu el tiuj premioj por la varbado. Kompletan liston de premioj, honvolu postuli de la Ĉefdelegito.

STATO DE UEA EN POLUJO. La 1-an de Aprilo 1932 UEA havis en Polujo 333 membrojn (4 MD, 9 MS, 146 MA, 159 M kaj 15 HM), krom tio 1 Esp. Entreprenon.

NOVAJ DELEGITOJ. Plezure ni notas novan Delegiton:

BORYSLAW. D. Joachim Altmann-Ehrlich, skr. poczt. 167.

Krome bonvolu noti la jenajn ŝanĝojn:

Adressanĝo: **BRZEŚĆ n. B. D. Rajnoldo Vonago, ul. Unji Lubelskiej 76.**

Streko: Provizore ne plu estas Delegito en Zabierzów.

Membroj en lokoj, kie ankoraŭ ne estas Delegitoj de UEA, bonvolu interkonsenti kun la Ĉefdelegito pri starigo de Delegitoj kaj Vicdelegitoj.

Białystok, la 1. 4. 1932.

J. ŠAPIRO, Ĉefdelegito de UEA.

ATENTU! PARTOPRENONTOJ

de la

XXIV-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Parizo, 30. Julio — 6 Aŭgusto 1932.

Adreso por korespondajoj: La XXIV-a Universala Kongreso de Esperanto, Maison de France, 101, avenue des Champs-Élysées, Paris-VIII.

Banko: La Société Générale (agence K.), Paris (Konto Nr. 10.115). Ĉekoj estu pagotaj al la „XXIV-a Universala Kongreso de Esperanto“.

Poŝtĉeka Konto: Oni adresu al „XXIV-e Congrès Universel d' Esperanto, Paris 1647-59“.

Kotizo: Kongreskartoj Nr. 12-100 inkl. kostos po mil francaj frankoj.

„ „ Nr. 101 ĝis fino kostos po 125 fr. fr. Post la 1-a de julio 1932. oni altigos la kotizon je 200 fr. fr.

Junulaj Membroj: Gejunuloj, kiuj havos ne pli ol 17 jarojn ĉe la 1-a de aŭgusto 1932, povas ricevi junulan kongreskarton po 30 fr. fr. (Ili raŭtos ricevi senpage la kongresan gazeton, sed ne la aliajn kongresajn dokumentojn). Post la 1-a de julio 1932. oni altigos la kotizon je 60 fr. fr.

Blinduloj: Oni donos senpagajn kongreskartojn al Esperantistaj blinduloj kaj po unu al ties gvidantoj vidantaj.

Fervojaj rabatoj: Francaj fervojoj — 42½% por ĉiu ir-kaj reven-bileto, por la veturado en Francujo. La rabato validas de la 25-a de julio ĝis 16 de aŭgusto inkl.

Ĉeĥoslovakaj fervojoj — 33¼%. Ĉi tiu rabato validos tri monatojn.

Loĝejoj (la prezoj enhavas servadon kaj impostojn):

Kategorio A: ĉambro kun unu lito por unu persono — po ĉambro 35 fr. fr.

ĉambro kun unu lito por du personoj — po ĉambro 55 fr. fr.

Kategorio B: ĉambro kun unu lito por unu persono — po ĉambro 30 fr. fr.

ĉambro kun unu lito por du personoj — po ĉambro 45 fr. fr.

Kategorio C: ĉambro kun unu lito por unu persono — po ĉambro 25 fr. fr.

ĉambro kun unu lito por du personoj — po ĉambro 35 fr. fr.

Kategorio D: ĉambro kun unu lito por unu persono — po ĉambro 20 fr. fr.

ĉambro kun unu lito por du personoj — po ĉambro 30 fr. fr.

La hoteloj en Kategorioj A kaj B estas luksaj; tiuj en Kategorio C estas modestaj sed komfortaj; kaj tiuj en Kategorio D estas simplaj.

GRAVA SCIIGO POR POLAJ GESAMIDEANOJ!

Pasportojn, por XXIV-a Univ. Kongreso de Esperanto en Parizo, prizorgas, kiel ĉiujare, Ekzekutiva Komitato de P. E. D. Ĉar la nombro de pasportoj estos tiujare limigita, ricevos ilin nur membroj de esp. grupoj, apartenantaj al Pollanda Esperanto Delegitaro. Por plifaciligi la laboron, ni petas la grupojn kolekti anoncojn de siaj membroj (antaŭnomo, nomo kaj adreso) kaj sendi ilin kune al s-ano Ludwik Kutscher, Kraków, Lubicz 34. Por kovri la kostojn de la pasportoj, ni petas pagi al la adreso por ĉiu pasporto 8 zł. Ĉiu anoncado sen mono ne estos akceptita. **Ce ĉiuj demandoj kaj petoj pri aliĝiloj aldonu nepre poŝtmarkon por poŝtelspezoj!**

Por Ekzekutiva Komitato de P. E. D.
Ludwik Kutscher

Redaktor odpowiedzialny: Julusz Kriss, Kraków.

Drukarnia Ludwika Gronusia i Ski w Krakowie, ul. Stolarska 6.

WYJAŚNIENIE !

Polskie Akad. T-wo Esperantystów, Warszawa, Leszno 99, m. 5.

prowadzące

Kurs korespondencyjny języka Esperanto

donosi, iż uczestnikiem kursu można zostać, wpłacając na wyż wymieniony adres zł. 15.—, ewentualnie w dwóch ratach: 10 zł. przy zapisie, resztę zaś po czwartej lekcji.

POLECA SIĘ

czwarte, zmienione w zupełności wydanie

„KOMPLETNEGO PODRĘCZNIKA JĘZYKA ESPERANTO“

Ułożył Leo Turno, autor „Wyższego Kursu Języka Esperanto“ i innych podręczników Esperanta.

Cena zł. 1.25

10 egz. — zł. 9.50; 20 egz. — zł. 18.50; 50 egz. — zł. 45.—

Tegoż autora:

„Słownik esp.-pol i pol.-esp.“ razem w jednym tomiku

Cena zł. 1.—

10 egz. — zł. 8.—; 20 egz. — zł. 15.—; 50 egz. — zł. 35.—

Wydal: **Dr. Leopold Dreher, Kraków, Starowiślna 37.**

Konto P. K. O. 405.716.

ETERNA BUKEDO

estas la plej nova granda verko de

K. KALOC'SAY

kontenanta senvelkajn florojn el la poezioj angla, bulgara, ĉeĥa, ĉina, egipta, estona, finna, franca, germana, greka, hebrea, hispana, hungara, itala, japana, latina, nederlanda, pola, portugala, rumana, rusa, sveda

Interpretite per perfekta formo, mirinda trasantokaj enlula vortmuziko estas en la libro poemoj de:

Faraono Ahn-Aton, Reĝo Salomon, Horatius, Catullus, Anakreon, St. Francisko de Assisi, Sappho, Walter von der Vogelweide, Dante, Lope de Vega, Ronsard, Chaucer, Shakespeare, Milton, Spenser, Keats, Shelley, Goethe, Schiller, Heine, Lenau, Baudelaire, Verlaine, Lamartine, Victor Hugo, Verhaeren, Vrchlicky, Mickiewicz, Vazov, Li-Tai-Po, Petöfi, Ady, Hitomaro, Curajuki, Puŝkin, Lermontov, Strindberg, Henriette Roland Holst, Stecchetti, Carducci, Leopardi, Camoens, Under, Semper kaj ceteraj.

La volumo, 13.5×20 cm. granda, 352 paĝa sur unuaranga papero, en duonleđa bindo koston usonajn dolarojn 2.20. Aldonu 10% por sendkostoj.

Eldonis **LITERATURA MONDO**, Budapest IX. Mester-u. 53. V. 7. Mendu de la eldonejo, de la reprezentantoj de **LITERATURA MONDO** aŭ de la seriozaj esperatistaj librovendejoj.

KORZYSTAJCIE Z OKAZJI — PÓKI ZAPAS STARCZY!

| | |
|---|----------|
| Belmont — Sonoj esperantaj | Zł. 1.00 |
| Czubryński — Esperanto i Esperantyzm; Wyd. I. | „ 1.25 |
| „ — Esperantyzm; Wyd. II. | „ 3.00 |
| Genthon István — La pentroarto en la malnova Hungarujo (trad. Dr. Fr. Szilágyi) bind | „ 26.50 |
| Greffkowicz — Niemi przemówią | „ 1.50 |
| „ — Spóźnione hasła, ze słown. esp.-pol. | „ 0.50 |
| Grosjean - Maupin — Plena Vortaro de Esperanto | „ 23.50 |
| Kabe — Internacia Krestomatio | „ 2.50 |
| Kuźma — Esperanto; gramatyka w 5 lekcjach | „ 0.50 |
| Smogorzewski — Pol-Pomeranio | „ 4.50 |
| Zakrzewski — Esperanto, historja i stan obecny | „ 0.80 |
| Zamenhof — Język międzyn. Esperanto (gram. i ćwiczenia) cz. I „ | 1.30 |

plus 10% na przesyłkę; polecona 60 gr. więcej, do nabycia w wyd. „Pola

Esperantisto“, Kraków, Lubicz 34. — Konto P. K. O. 406.660.

Bezpłatny katalog książek wysyłamy na żądanie.

Ĉiu serioza esperantisto legos kun granda intereso

KAZIMIERZ SMOGORZEWSKI

POL-POMERANIO

kun 26 kartoj (4 plurkoloraj), 136 paĝoj; el la franca tradukis S. Grenkamp-Kornfeld.

Prezo zł. 4.50, plus 10% por afranko. Ricevebla ĉe Libreja Fako de „Pola Esperantisto“ Kraków, Lubicz 34. Konto PKO 406.660.

ITALA ESPERANTO FRAZARO POR VOJAĜANTOJ ELDONITA DE LA FA-SISTA FERVOJA POSTLABORO DE TORINO.

La Faŝista Fervoja Postlaboro de Torino eldonis kvarpaĝan kartonan broŝureton, kies enhavo Konsistas el praktika bone ordigita „Frazaro por la Vojaĝanto“ en la du lingvoj: itala-Esperanto; la eksterlanda vojaĝanto sur italaj fervojoj povas per la frazaro, se li estas esperantisto, facile alparoli la fervojan personaron aŭ informiĝi ĉe la stacidomoj. La Esperantista Grupo de Fervojistoj de Torino (grupo de la Itala Esp. Federacio) zorgis la verkadon de la broŝureto, kiu estas nepre rekomendinda kaj senpage havebla ĝin demandante al la adreso:

DOPOLAVORO FERROVIARO, Via Sacchi, 25 bis, TORINO (Italujo)

ĈU VI JAM RENOVIGIS LA ABONON POR J. 1932?

SE NE

PAGU TUJ JE NIA KONTO P. K. O. 406.660.

Abonu mem kaj varbu novajn abonantojn por la sola esperanta gazeto en Pollando!

Redaktor odpowiedzialny: Juljusz Kriss.

Drukarnia Ludwika Gronosta i S-ki w Krakowie, Stolarska 6.

